

& Mia nomo ne gravas:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 522 paŝoj dum 6 minutoj. Kanton verkis kaj valson komponis Mikaelo Bronŝtein. Per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado kaj disduigante strofojn baladigis Martin Strid (2015). Klarigo (*): '8 Sovetunia esperantista junulara movado. '10 Angle fraŭlino.>

(#Melodio:

(#Valso: <1,0:> o;DoDo /DoDodo La So oMiMi /FaMiRe Do o o;dodo /dodore midoo o ododo /doSodo So o o;;dodo /dodore mi do ododo /doLado So o o;DoDo /DoDodo La So oMiMi /FaMiRe do o)

?

(# Bresta balado: <1,5:29>

doTi /reedodo doTi TiLa /La LaMi La; LaTi /dooTiTi TiTi TiTi /Ti Tire do;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 Mia /nomo ne gravas, mia /aĝo – des pli. ;
Nur mo/destan kanteton mi pre/zentos al vi.

(&Bresta: (×; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!))**

'2 Mala/peras amikoj en ha/ladzo de l' viv' – ;
Nur pri /tio bedaŭras mia /simpla motiv'.

'3 Estis iam aktiva unu nia amik'. ; Lia ventromelono kreskas nun kun efik'.

'4 Li adoras tagmanĝon, vesper/manĝon – des pli. ; Maten/manĝo abunda estas sankta por li.

'5 Li eĉ aspirantiĝis ŝajnas, ke pro malsat', ; Ĉar pli bonan tagmanĝon havas "la kandidat".

'6 Lia ĉefo ordonis kun mirinda rigor': ;
"Malbenitan lingvaĉon vi forĵetu el l' kor'!".

'7 "Iru for, Esperanto, – li esploris kun trist'. – ;
Povas nun nur doktoro resti esperantist'.

'8 Kiam mi doktoriĝos, mi forkuros el hejml'. ;
Pacience atendu la doktoron, ho SEJM*.

'9 En tendaroj aperis simpatia fraŭlin'. ; Ĉiu dua junulo en anim' amis ŝin.

'10 Ŝiaj bluaj okuloj estis vera turkis'. ; Pro agemo kaj belo ni elektis ŝin "Miss"*.

'11 Tamen pasis la tagoj – post gepatra admon' ;
Ŝi akceptis proponon de la certa person',

'12 Kiu dum rendezuoj babiladis kun flat': ;
"Mia amo – Beethoven kaj ... moderna kravat'".

'13 Iam lernis l' germanan li en la institut'. ; Kaj memoras ke "bone" ŝajne estas "sehr gut".

'14 Tiom certe sufiĉas en la certa medi'... ; Plu l' knabin' ne aperas en tendaroj kun ni.

'15 Daŭri kanto simila certe povas sen fin'. ;
Sed, "ĉu estos moralo?" – tuj demandas vi min.

'16 La moralo aperos – mi ne miras pro l' pet' – ;
Ni kutimis ricevi sencon sur teleret'.

'17 Ni kutimis pardoni, se amik' sen hezit' ;
Oferadas la sentojn por trankvil' kaj profit'.

'18 Malaperas amikoj en haladzo de l' viv' – ;
Nur pri tio bedaŭras mia simpla motiv'.)